

ESPERANTO JUNULARO

CIRKULERO DE SUDBOHEMIA ESPERANTISTA JUNULARO

URBO STRAKONICE

Urbo Strakonice devenis de samnoma komunumo etendiĝanta super kunfluo de du riveroj Otava kaj Volyňka, per efiko de la kastelo kaj sub ĝia protekto. Fondintoj de la kastelo estis Bavor-oj el Strakonice, nobelara ĉeĥa gento, kiu floris en XIII kaj XIVa jarcento. Al la fino de XIV. jarcento tiu ĉi gento degeneris kaj malaperis. Kastelo estis fondita inter jaroj 1220 - 1235. Ekzisto de Strakonice estis konfirmita unue en jaro 1225 de sinjorino Bolemila, edzino de sinjoro Bavor la Ia.

XX XX XX

XX XX

XX

Raporto de junularo Ĉ. B u d ě j o v i c e.

En nia laborkonferenco ni decidis, ke ĉiuj anoj de nia junularo varbos almenaŭ unu vizitanton de kurso por komencantoj. Tiu ĉi kurso komencos post libertempo en nia kunvenejo.

Dum niaj kunvenoj, ĉiuĵaŭde, ni progresas en Esperanto per legado, tradukado ktp., per kio niaj membroj pliboniĝas en lingvo.

Ĉar nia presreferanto s-ano Nymburský forlasos nian klubon al lia nova laborloko en Chrudim, estis balotate pri nova presreferanto, kiu estos s-ino Květa K r e j ĉ o v á.

Ĉar ĉiuloke mankas papero, ni ne scias ĉu ni povos plu eldoni nian cirkuleron en tiu ĉi multnombreco kiel kutime.

Raporto pri agado de junularo en P í s e k.

En majo oni finis en Písek kurson por komencantoj per sriba ekzameno. La ekzamenon faris 7 gekursanoj (kurson vizitadis 9 gekursanoj). Dum ekzameno ni ekkonis, ke ĉiuj gesamideanoj bone enpenetris en Esperanton.

Junularo en Písek volas ankaŭ aranĝi esperantan ekspozicion en ia vidaĵfenestro sur urba placo en Písek. Per tiu ĉi ekspozicio ili volas konatigi ĉiujn homojn en ilia urbo kun laboro de esperantistoj kaj gajni novajn interesatoj por nova kurso por komencantoj. Tiu ĉi kurso estos aranĝita post ferioj.

Atentigo!

Redakcio petas ĉiujn legantöjn, ke ili afable korigu la frazon en la linio 5-a de malsupre sur la paĝo 2 de nia lasta cirkulero (Nro 5). En ĉi tiu frazo estas preseraro. La frazo "Pri hodiaŭa situacio en nia movado" ne estas finita ĉar ĉi tie mankas "parolis s-ano Hromada." Do tuta frazo: "Pri hodiaŭa situacio en nia movado parolis s-ano Hromada."

Alvenintaj subtenoj:

Esperanta grupo S t r a k o n i c e
Ni elkore dankas.

Kĉs 200,-

Scienco kaj Esperanto.

Oni ofte diras, ke homoj estas karakterizitaj per du faktoroj: unue ili havas lingvojn por kompreni unu la alian, due ili uzas instrumentojn por realigi la dezirojn.

Certe, eĉ se aliaj animaloj ofte esprimas sin por sonoj, oni prave povas diri, ke nur homoj havas lingvojn. Esperanto, lingvo internacia, okupas unikan lokon inter ili.

Aliaj lingvoj naciaj estas por la propraj nacioj, sed ne por la tuta homaro. Kelkaj naciaj lingvoj kiel la angla, franca, germana, rusa, k.t.p. estas kvazaŭ internaciaj, tamen vere internacia lingvo ne devas esti el tiuj naciaj lingvoj, kiuj donas privilegion aŭ profiton al difinitaj popoloj.

Nur neŭtrala lingvo artefarita povas esti vere internacia. Ne nur progresemaj homoj, sed ankaŭ la plejparto de la homaro amas la pacon kaj deziras la feliĉon de homaro. Tial ili ne pli povas esti indiferentaj al Esperanto, lingvo internacia, neŭtrala kaj kreita de Dro Zamenhof kun la idealo de mondopaco kaj feliĉo de la tuta homaro.

Simio grimpas sur arbon por kapti la fruktojn ĉe la arbo. Kontraŭe homoj uzas ŝtuparon por supreniri kaj ilin aŭ uzas longan tondilon por ilin obteni.

La unua ne uzas instrumenton, la dua faras kaj uzas ĝin por atingi la celon. Oni povas diri, ke scienco estu la plej altgranda instrumentaro.

Por fabriki instrumentojn, oni devas esplori naturon, karakteron kaj strukturon de la materialoj. Tio estas la pura scienco.

Oni fabrikas instrumentoj por diversaj deziroj. Tio estas aplikata saienco.

Scienco konsistas el la esplorado de la nutura de la tuta mondo, la tuta universo kaj la fabrikado de objektoj utilaj por la homa vivo. Unuvorte scienco estas la plej altgranda instrumentaro.

Progresemaj homoj, inkluzive progresemaj sciencistoj, insistas ke scienco ne devas esti instrumentaro por la milito aŭ por la profitoj de iuj difinitaj popoloj aŭ privilegiaj klasoj, sed ĝi devas esti la instrumentaro por la feliĉo de la tuta homaro.

Nome la idealo, kiun ni havas koncerne la sciencon, tute koincidas kun la idealo de Dro Zamenhof.

Do progresemaj homoj, kiuj scias, ke ĉiuj nacioj, ĉiuj homoj devas esti egalrajtaj, ne povas esti indiferentaj al Esperanto.

Homoj distingiĝas de aliaj animaloj per la uzado de lingvoj, kaj instrumentoj.

Esperanto estas unika lingvo, nome lingvo universala por la tuta homaro. Scienco estas ankaŭ la unika instrumento, kiu ankaŭ devas esti por la feliĉo de la tuta homaro.

Progresema sciencistoj, kiuj scias ke scienco devas esti por la feliĉo de la tuta homaro, komprenas la idealon de Dro Zamenhof kaj devas havi intereson pri nia Esperanto-movado.

Ploss Jos.

František Gellner

(naskita 1881 en Praha - mortinta 1918 kiel malaperinta).

K u d r i s t i n o .

Somera aero ekstere odoris impete.

Ĉe malfermita fenestro estis ĝi kiel vino.

Lacege metis la manojn sindone ampete
malgranda, malgrasa kudristino.

En malplenon antaŭ ŝi rigardis aŭdante
eternan, internan kantmelodion,
kies sur kordoj koraj eltiris tremante,
serĉante por sia animo belegan ion.

Kaj kudristino silente flustretis vere:

"Ia barilo eble nun kontraŭstaras

kunvenon homan eĉ nur po ere

kaj tiam mil vivoj vegetas kaj barojn faras."

Traduko el ĉeĥa lingvo de
Sonja Zedníková, dediĉita al
Korniko, Praha.

Nia leganto el Bulgarujo skribas:

"Rilate de mankoj en la cirkulero kaj de spertecoj, mi konstatas, ke la cirkuleroj estas tre arte presitaj, ankaŭ estas tre arte preparitaj la pentraĵoj. La humora paĝo estas belega - oni diras: "Rido sanigas."

Mi scias bone pri la situacio, en kiu vi laboras; kaj via laboro estas belega. Mi permesas al mi rekomendi, se estas eble, ke en cirkulero estu malgranda koloneto kroniko - informo pri esperanta laboro de lokaj grupoj (pripensu, lokaj grupoj - rim. de redakcio)...

Mi malfermis kurson por komencantoj. Estas 9 gelernantoj – junaj gesimpatianoj. Post du aŭ tri semajnoj mi dezirus kunligi ilin kun gesamideanoj en ĈSR."

Do ni instigas vin, ke vi skribu grandamase al adreso:

Lubmír Kr. Levičaroff
ul. "Iu. Nenof Nro. 13.
Pasarĝik – Bulgarujo. /red./

La ŝlosilo de la Feliĉo.

Via situacio en la vivo estas, estis kaj estos la rezultato de viaj pensoj, tiel kiel ĉio kio ekzistas en via ĉirkaŭaĵo estas rezulto de unu penso.

Konsekvence, se via hodiaŭa vivo estas rezultado de hieraŭa penso, via morgaŭa vivo estos rezultado de hodiaŭa penso.

Se via situacio estas doloriga aŭ malfacila kaj vi suferas malsanojn, k.c. tio estas pro la negativa penso.

Pensi negative estas protesti pro ĉio, pensi malbone pri ĉiuj kritiki, abomeni pri la vivo, sin konsideri malfeliĉa malami, kuraĝiĝi al la venĝo, al la malamo kc.

Se vi deziras ŝanĝi vian vivon, ŝanĝu vian pensomanieron kaj sentoj al ĉiuj: Ne protestu pro malfacilaj situacioj. Do Vi povas transformi ilin, bone pensu pri ĉiuj, bone parolu pri ĉio en la vivo, vin sentu feliĉa, plena je sukceso kaj prospereco, pardonu kaj forgesu.

Kiam vi estas kapabla por tion fari, tiam, dufoje tage, matene kaj vespere, vi vin rigardu en la imago, kiel vi volas esti, rigardu vian vivon kiel vi deziras ke ĝi estu, sentante ke la Universala Povo, la Senfinia Vivo de la Esto, kiun ni nomas Amo, ĉeestanta interne de ĉiuj la Estuloj. Li estas aganta en vi mem, kaj kion vi imagas efektivigi.

Ne ŝanĝu ideojn, kaj tutvole fiksi en via menso kion vi deziras, por ke ĝi efektivigu.

Vi vin sentu libera kaj feliĉa ĉar vi povas transformi vian vivon laŭ via deziro, se vi purigas vian koron je malaltaj sentoj kaj vian menson je malbonaj pensoj, do, se vi malbone pensas por la aliaj, tiu malbono sin turnos kontraŭ vi.

Ploss Jos.

Post laboro bonhumoro

Mensogantoj!!!

Du amikoj unufoje vetis kiuj el ili konas plej bone mensogi. Amiko A. diris: iun tagon mi promenis laŭ la rivero Vltava, ekvidinte sur la dua riverbordo mian amikinon. Tuj mi ekdeziris, ke alkresku al mi flugiloj, por ke mi povu transflugi al alia riverbordo.

Amiko A., demandis amikon B: ĉu vi vidis min?

Amiko B. respondis: Jes! Mi vidis vin, kiel tuj alkreskis flugiloj al vi kaj tiel vi transflugis riveron.

Du amikinoj

S-ino A. rapidis kun sia filino stacidomon, dumvoje renkontis S-inon B., kiu ŝin demandis kial vi tiel rapidas?

S-ino A. respondis: Stacidomon.

S-ino B. Kien vi veturas?

S-ino A.: i ne! Sed mia filino veturos kuracbanlokon Karlovy Vary.

S-ino B.: Ĉu ŝi estas malsana? Kio mankas al al ŝi?

S-ino A. respondis: Unu bela fianĉo."

La Tapiŝvendisto.

Kiam mi iam vojaĝis Balkanlandoj, mi dumvoje renkontis la tapiŝvendiston kun lia azeno. Mi demandis lin ĉu vi sufiĉe vendas tiujn belajn tapiŝojn? Bedaŭrinde ne. Kial? Ĉar mi malmulte interkompreniĝas kun tiuj Balkanaj nacioj.

Sed tiuj miaj azenoj interkompreniĝas, kiam mi alvenos en karavanseraĵojn kun ĉiuj azenoj el tuta mondo. Sed mi homo ne povas interkompreniĝi en Balkanlandoj kaj ankaŭ en tuta mondo.

J. Ploss.

Eldonas senpage kaj laŭbezone ZK ROH poštovních zaměstnanců, Č. Budějovice, Esperanto-sekcio. Redaktas komitato de ESPERANTO-JUNULARO, Č. Budějovice. Korespondadreso: ESPERANTO-JUNULARO, Šumavská 250, České Budějovice.
